

& Se la sorto persekutas:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 1443 paŝoj dum 16 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,6:37> (

/LaLa LaLa Tido Ti Ti; dodo dodo remi re; TiTi TiTi doTi La So; fafa fafa mire do;

(#Rekantaĵe: mimi rere mifa mi; doododo TiTi redo Ti; mimi re re doTi La So; mimi rere mifa mi i)
)×39)+

(&Strofoj:

'1 /Se la sorto persekutas, ; Homo devas fleksi sin, ; Kiel ajn li eĉ kondutas, ; Sorto ĉiam venkas lin.

(×: **Ĉarma bela la reĝin' ; Verda okulo ravas lin ; La reĝino senkompara ; Ĉarma bela la reĝin'.**)

'2 Dum Viena la foiro ; En la lastpasinta jar' ; Promenadis juna viro ; Meze inter la bestar'.
.....

'3 Al Vieno li vojaĝis ; El vilaĝ' en kampa val',
; Kaj nur bestoj al li plaĉis ; Bovo, porko kaj ĉeval'.
.....

'4 kaj en fako porabela ; Io tre mirigis lin : Tie estis vere bela ; Ĉarma tre abelreĝin'.
.....

'5 Havis verdajn jen okulojn ; Kaj kruraron flavan ĝi ; Ĝin kaj sep laborkunulojn ; Sen hezit' aĉetis li.
.....

'6 En skatolon la kartonan ; Devis iri la reĝin', ; Kaj en poŝon pantalonan ; La junulo metis ĝin'.
.....

'7 Sed la tempo ne hezitis, ; Estis jam la deka hor'; Tra la urbo li rapidis ; Al la stacidomo for.
.....

'8 Vagonar' jam ekveturis ; Tra la pord' de l' stacidom' ; Li en la vagonon kuris, ; falis sed pro dika hom'.
.....

'9 Iu diris tuj kun moko : "Ŝajne regas lin la vin!" – ; Li paŝetis al sidloko, ; Volis ne plu movi sin.
.....

'10 Sed sur lia dekstra kruro ; Ŝajne migras iu best'! ; Li ĝin palpis kun teruro ; Per rapida vigla gest'.
.....

'11 Sed apudan la matronon ; Li puŝetis per kubut', ; Kaj ŝi diris tuj admonon : "Ĉesu via fikondut'!"
.....

'12 Timigite li silentis, ; Ne plu riskis movi sin. ; Sed sur sia kruro sentis ; bestmigradon li sen fin'.
.....

'13 Ho kruela vi fatalo, ; Stranga estas via vol' ; Dum la menciita falo ; Ja rompiĝis la skatol'.
.....

'14 Kaj el poŝ' de l' pantalono ; Tra trueto rampis for ; La abeloj ; sub kalsono ; Ili migris kun fervor'.
.....

'15 Kaj subite laŭte kriis ; Pro dolor' la juna vir', ; Kaj neniu homo sciis, ; Kion fari do pro mir'.
.....

'16 "Kial vi nun tiom bruis?" ; Alparolis lin sinjor'. ; Sed li frotis, forte skuis ; Sian kruron pro dolor'.
.....

'17 Li respondis ekscitite ; Ili ĉiuj kuris for, ; Ili pikis min subite ; Laŭ kutima sia mor'.
.....

'18 Ve! Ho ve! Ĝi min torturas, ; Ili tiom pikas min! ; Se ne ĉiuj vi forkuras, ; Ili pikos ankaŭ vin!"
.....

'19 Kaj tuj kriis tuta ĥoro : "Estas li freneza hom' ; Helpu, helpu, konduktoro, ; Kuris li el ŝtata dom'!"
.....

'20 "Gesinjoroj, silentadon! ; Tuj ni haltos ja en Moor, ; Tuj esploros ni la staton ; Kiu el vi kuris for?"
.....

'21 Jen la vagonaro haltis ; Ĉe stacia la peron' ; Kaj la pasaĝeroj saltis ; Time for el la vagon'.
.....

'22 Oni ŝlosis tuj la pordon, ; Kaj la ĉef' de l' stacidom' ; Kriis do, por fari ordon, ; Tra l' fenestro al la hom':
.....

'23 "Ĉu sincere do konfesis ; La forkuron vi, sinjor'?" ; La alia vigle jesis ; "Certe, ĉiuj estas for!"
.....

'24 "Ĉiuj? Kiom do kuniris?" ; "Sep simpluloj kaŝis sin" ; La junul' malgaje diris, ; "Kaj kun ili la reĝin'."

'25 "Ĉu reĝin' kun sep kunuloj? ; Kiel do aspektis ŝi?" ; "Verdaj estas la okuloj, ; Flavajn krurojn havas ĝi."

'26 "Jen reĝino senkompara! ; Kiu akompanis ŝin?" ; "Abelaro ordinara", ; La junul' informis lin.

'27 "Sed ne havu nun subite ; Vi abelojn en la kap'!" – ; "Ho" respondis li rapide, ; "Ili estas ne sub ĉap'."

'28 "Kie do?" – "Sub la kalsono. ; Ve! Ho, ili pikas min! ; Iru for de la vagono, ; Ili pikos ankaŭ vin!" –

'29 Oni sed jam tro atendis, ; Pasis jam kvarona hor', ; Kaj la staciestro sendis ; Do la vagonaron for.

'30 Jen okupis la vagonon ; Sole nun la kampan'; ; Pantalono kaj kalsonon ; Tuj deprenis lia man'.

'31 Tra l' fenestro kun kolero ; Ilin svingis la sinjor', ; Ses insektoj tra l' aero ; Tuj por ĉiam flugis for.

'32 Sed jen restis du abeloj; Flugu for, malica par'! ; Jen! Sur la najbaraj reloj ; Preterkuris vagonar'.

'33 La junulo preskaŭ svenis ; Kaj skuegis lin terur'; Sed la vagonaro prenis ; Liajn krurvestaĵojn nur!

'34 Pro la nova bat' de l' sorto ; Malesperis la junul', ; Kaj per sia lasta forto ; Li sin kaŝis en angul'.

'35 Kaj denove nun ekhaltis ; En urbet' la vagonar', ; Kaj tra l' pordo enen saltis ; juna policista par'.

'36 Kaj ekridis ambaŭ krie, ; Rigardante al angul': ; "Jen li vestis sin alie, ; Efektiva frenezul'!"

'37 Kaj mantelon tuj alportis ; Ili al la juna hom', ; Kaj tra l' urbo lin eskortis ; Al la policeja dom'.

'38 Tie ja post longa peno ; Fine montris la esplor' ; ke nur estis miskompreno; Liberiĝis la sinjor'.

'39 Se la sorto persekutas, ; Homo devas fleksi sin, ; Kiel ajn eĉ hom' kondutas, ; Sorto ĉiam venkas lin.)